

Provenca
Esperanto-Federacio
kvaronjara gazeto
141
somero 2025



Leĝa depono ĉe BNF

ISSN 2609-5203

Federacia retejo

www.esperanto-provence.org

Prezidanto

Rosy Inaudi - 06 18 35 18 40

r.inaudi@free.fr

Aliĝkotizo (kun la gazeto) : 10€

> ĉeko al : **Esperanto-Provence**

pere de via loka asocio

aŭ sendota al la kasisto

Marc Gallardo

Les Hespérides II Bât. B2

67 bd des Alpes- 13012 Marseille

gallardomarc@gmail.com

06 09 89 09 14

> aŭ bankĝiro

(bankinformoj sendotaj laŭpete)

Por Esperanto-Marseille la kotizo

devas esti pagita al Esperanto-France

<https://esperanto-france.org>

Redaktoro

Pascal Panarotto - 06 26 34 30 93

ilarione13@outlook.fr

Grafikistino

Mh Bertucceli

mhbortucceli@gmail.com

Limdato por sendo de

publikotaĵoj por la venonta n°

15-a de septembro 2025

bonvolu sendi al la supra retadreso



antaŭdankojn pro viaj kontribuadoj

Vorto de la redaktoro

Post la presado de la gazeto numero 140, mi diris dum la kurso de Esperanto la sekvintan mardon: « NI ATINGIS NIAN CELON! »: sendi la numeron unu.

Hodiaŭ aliaj laboroj motigivas nin: pli-larĝigi la liston de redaktoroj, do mi skribos, unue, kreintoj de artikoloj antaŭ, mi esperas pozitivajn respondojn.

Krome, ni provos skribi multe en Esperanto, estas bone por la redaktoroj kaj por la legantoj.

Fine, mi volas instigi vin paroli pri Esperanto, pri Sinjoro ZAMENHOF, la buŝ' al orelo estas tre grava por transdoni nian entuziazmon por la SOLA internacia lingvo kaj proklami, ke la angla lingvo ne estas internacia lingvo.

Ek
al la laboro !



Fokuso

Esperanto, tie ĉi funkcias !

Mi tuj rakontos anekdoton: mi iris en la ĝeneralan kunvenon esperantiston de la regiono.

Mi manĝis kun aliaj esperantistoj kaj hazarde, mi troviĝis apud du virinoj kaj ni komencis babili en Esperanto, evidente.

Miraklo? NE, forteco de nia lingvo? JES ni interŝanĝis vortojn, frazojn ankaŭ, facile.

Ĉefe ni rakontis la plezuron komuniki, en la sola lingvo Esperanto.

Pardonu, mi forgesis diri ke la unua virino venis de Svislando, la dua de Rusio kaj ili ne parolis la francan lingvon. MIRINDE!!

Enhavo

3-4-5	Interasocia kongreso en Nantes
6	La arta programo dum la kongreso en Nantes
7	Vizito de la esperanto-muzeo en Vieno
8-9	Renkonto kun Daimi kaj Miguel
10-11	Intervjuo de Daimi kaj Miguel
12-13	Esploro de Esperanto-muzeo en Japanio
14	Letero de la legantoj
15	Recepto : Korsikaj Kanistrelli
16	Agendo

**Pasigu parton de via somero en kastelo, meze de naturo,
kun esperantistoj, en plaĉa internacia etoso: apud Angers**

30/06-10/07: maratona kurso de Esperanto

30/06-07/07: kongreso de blindaj esperantistoj

21/07-31/07: festa semajno de esperantaj familioj kun infanoj

09/08-16/08: kongreso de Sennacia Asocio Tutmonda (SAT)

24/08-29/08: verda semajno de esperantaj naturistoj

[Informoj, aliĝo en https://gresillon.org/?lang=eo](https://gresillon.org/?lang=eo)



BIENVENUE à NANTES

Renée Triolle

Du 7 au 9 mai, Nantes a accueilli le congrès annuel d'Espéranto-France, sous le soleil, dans l'ancienne manufacture de cigarettes, très adaptée, à 10 minutes à pied de la gare et des hôtels. Le congrès annuel a plusieurs buts : faire le point sur la situation de l'espéranto en France avec renouvellement du CA, élection du nouveau bureau, commission d'Europe-Démocratie-Espéranto, réunion de Europe Ecology les Verts et son travail de nomenclature ; redonner de l'énergie aux 140 participants qui peuvent se rencontrer et discuter. Merci à la vingtaine d'étrangers (d'Angleterre, Hongrie, Russie, Estonie, Italie etc), attirés par le post-congrès dans la Maison culturelle d'espéranto, le château de Grésillon près d'Angers. Un autre but est de faire connaître la ville et sa région : les visites guidées dans Nantes ont fait le plein, ainsi que les chantiers de Saint-Nazaire, sans parler des conférences sur la ville ou Jules Verne, l'enfant du pays, espérantiste de cœur (il a été président du groupe espérantiste d'Amiens

et avait commencé un livre où les personnages parlaient espéranto). Les jeunes ont, dans un film, rendu compte de leurs voyages des Pays-Bas à la Serbie, grâce à l'espéranto et les chambres gratuites chez l'habitant par le Pasporta Servo. Un autre film rendait hommage à Navalny, opposant à Poutine, car les espérantistes sont bien dans leur siècle. Mission accomplie pour les organisateurs qui ont déploré qu'à cause de Vigipirate, ils n'aient pu ouvrir les expositions, sur l'espéranto, réponse alternative pour une communication équitable, et sur Lucien Péraire qui dans les années 30 est allé en vélo jusqu'en Asie en utilisant les rails du Transsibérien ! le service de librairie, tenu par Said, le permanent d'Espéranto-France, les concerts (lire le rapport de Bernard Bigonnet) portes ouvertes à la culture de la langue internationale . Les Provençaux (Rosy, Marc, Thierry, Renée, Bernard et Philippe avec Arthur, 3 ans n'ont pas regretté le voyage ! A l'an prochain.

SUKCESA INTERASOCIA KONGRESO EN NANTES (7-9 junio 2025)

Renée Triolle



Ĉar mi mem partoprenis dekojn da kongresoj kaj mem kunorganizis naciajn (en La Roque d'Anthéron, Martigues kaj Marseille) mi rajtas taksi la ĉijaran kongreson en Nantes tre sukcesa. Ŝajne propono pri postkongreso en Grezijono allogis eksterlandanojn (el Britio, Italio, Rusio, Nederlando, Hungario) kio pravigis la neceson paroli Esperante kaj ne tro krokodili ! La kongresejo estis perfekta: ĝi situas apud la stacidomo, la hoteloj kaj amaso da



restoracie-toj; ĝi estis malfermita al la publiko kaj prezentis du ekspoziciojn: la paneloj de Esperanto-France kaj fotoj reprezentaj el la notoj de Lucien Pereire, tiu laboristo, kiu vizitis Eŭroazion per biciklo de 1928 ĝis 1932.

Granda salono gastigis la malfermon kaj fermon, la Ĝeneralan Asembleon de Esperanto-France, kiu elektis sian novan komitaton kaj estraranon (i.a. junulo el Marseille, Clément Rousset, matematikisto), prelegon pri Jules Verne, la lokulo, kies muzeo estis vizitata; kaj prelegon pri «Mil unu noktoj» far Said kaj plurajn komfortajn pli malgrandajn por





laborkunsidoj (Eŭropo-Demokratio-Esperanto, Komisiono pri Esperanto kaj Lingvojn de les Ecologistes) kaj fotelojn por amikaj babiladoj. Kongreso estas okazo konatiĝi kun regiono aŭ urbo: ĉiuj vizitoj al Nantes, la surinsulaj maŝinoj, estis plenplenaj, prelego pri historio de Nantes far Gouverneur tre interesa, prelego pri Jules Verne far Istvan Ertl informplena. Kongreso estas ankaŭ okazo kleriĝi pri la Esperanto-movado, al tio tre helpis la libro-servo, kie seninterrompe deĵoris Said; filmo pri Aruŝa (Tanzanio, lando de la pasintjara Universala Kongreso de UEA), filmo de junulo, Gabin Forcier, kiu uzis Pasportan Servon «Esperante



interasocia kongreso



Eŭropen», kurso por komencantoj, ekzamensesio de FEI. Eĉ se esperantistoj pledas por alitipa mondo, ĉefe pri komunikado, ili vivas en la mondo: Aleksej Salomatov (Rusio, respondeculo de la rubriko «Arto» ĉe Monato), muntis filmon kun subtitoloj en Esperanto». Lastaj respektoj por opoziciulo Aleksej Navalnij «eĉ se la temo estas grava, ni ludis pri «la klimata mozaiko»; aliaj ludoj estis lingvaj, aŭ kanta-teljero, aŭ origami, japana arto de paperfaldado. Tre bone funkciis la trinkejo, dum la aperitivo estis tre abunda ĉar la pladojn kaj vinojn malavare portis la kongresanoj el siaj regionoj.

Mi bonvenigas vin al la venontjara kongreso, ne timu, vi ĝuos pro la bunteco de la programeroj, vi certe trovos tion, kio allogas vin aŭ malfermos al vi novajn pordojn !

Interasocia kongreso

La arta programo dum la kongreso en Nantes

Bernard Bigonnet



Sabaton posttagmeze la fama grupo Kajto, el Nederlando, proponis al la kongresanoj kant-atelieron. Vespere ni malkovris paron de kantistinoj, La Abeloj, kiu loĝas en Tours. Ili kantis kelkajn kantojn en Esperanto, kaj multajn en diversaj lingvoj, duvoĉe. Tio multe plaĉis al la aŭskultantoj.

Sekvis bretona balo, dank' al Viktoria kaj ŝiaj muzikistoj. Homoj tre

volonte kaj ĝoje dancis grupe laŭ bretona kaj popola tradicio.

Dimanĉon okazis koncerto de Kajto, kiu entuziasmigis nin kiel kutime. Poezio, revo, pripensaĵo pri nia vivo vojaĝigis nin en amika, kortuŝa etoso. Ankie kaj Nanne uzis plurajn instrumentojn, donis al ni la tekstojn surekrane por faciligi nian partoprenon kaj kantis tre ofte duvoĉe por nia granda plezuro. Publiko kore respondis al tiu belega donaco.





VIZITO DE LA ESPERANTO-MUZEO EN VIENO

Paulette Chiarisoli

Fine de majo, mia edzo kaj mi iris al Vieno. Kompreneble, ni vizitis la Esperanto-Muzeon. Ĝi situas en la urbocentro, en belega konstruaĵo.

Ni estis salutitaj de Bernhard, kiun mi kontaktis antaŭe. Li rakontis al ni pri la muzeo. Tri dungitoj parolas Esperanton.

La muzeo estas tre populara, kun ĉirkaŭ 18 000 vizitantoj jare, sed la plej multaj ne parolas Esperanton. Kelkaj klasoj venas kun siaj instruistoj.

Ni havis longan diskuton pri la kialoj, kiuj instigis nin lerni Esperanton. Ni aranĝis renkonti Bernhard por lia sekva vizito al Francio.

La muzeo estas tre ampleksa. Ĝi klarigas la vivon de Zamenhof per fotoj. Filmo prezentas la lingvon kaj ĝian historion.

Estas multaj afiŝoj de kongresoj, precipe el Francio, Marsejlo, Parizo kaj Lourdes.



NI AKCEPTIS DAIMI KAJ MIGUEL, AMIKOJ KUBANOJ

Renée Triolle

Mardon: en la aŭstobusstacio, Pascal atendadis kun la Esperanto-gazeto. Poste li manĝigis kun ili kaj portis ilin en la sidejon de CIRA por la prelego en la loko.

Ĉeestis la kursanoj, kutimaj esperantistoj kaj mia amikino, instruisto de la hispana. Ne teknikaj problemoj, estis fotoj, iuj faris demandojn



Sekve merkredon : matene Miguel laboris ĉe mia komputilo por prepari memorbastoneton. En la prelegejo en

La Ciotat, le Grand Portique, ĉeestis 16 homoj (nur 4 esperantistoj, la aliaj estis for pro la festotagoj). Laŭ mi li pli bone adaptiĝis al la deziroj de la ĉeestantoj; iuj faris demandojn ankoraŭ, unu invitis ilin al tagmanĝo vendrede.

Ili gastis ĉe mi en La Ciotat sed ankaŭ en Le Beaŭsset ĉe Pierre kaj Nicole.

La 1an de majo 2025 estis pikniko en mia domo, tre agrabla (eĉ aperis Kristian, kiu de 4-5 jaroj ne plu vivsignis sed bone memoris pri niaj «piknikoj»). Daimi kantis kaj Sylvain ludis jukulele sed ankaŭ premiere kantis kanton, ĵus tradukitan de li pri homo, kiu volas vivi en La Ciotat. Kaj ni kune plantis figarbon, donacitan de ukrainaj geamikoj, kiuj elfosis la truon!



Dankojn al ili .





Renkonto

po de Marsejlo kaj mi, kiuj dividas la vojaĝprezojn de Orléans al Marseille) duoble pli sed ne reklamas duoble pli. En La Ciotat, la vizitintoj ricevis la informojn legante


Vendredon: mi portis ilin al inaŭguro de pentraĵoj de afrika pentristo en

Lycée de la Méditerranée, kie antaŭ kelkaj jaroj mi instruis Esperanton

Sabaton: Pascal preparis bonan ekskurson tra Marseille. Vizito de eksterlandanoj estas reklamilo por la lokaj grupoj (kvankam, kiel mi diris al Miguel, la fakto, ke ili venas duope kostas al ni - la gru-

la anoncon en « La Provenco», vidante afiŝojn tra la urbo aŭ en publikaj lokoj, ekz. urba centro Deidier, ricevinte retmesaĝojn.

Dimanĉo: Ili forveturis al Berlino (ilia aŭtobus-bileto estas pagita de ilia germana amiko...) malgraŭ siaj multnombraj valizoj ili pretas forporti mian malnovan komputilon, kies teknologio pli respondas la kuban teknikon ol la nunaj.



Demandoj kaj respondoj

Pascal Panarotto



En aprilo, venis du samideanoj de Kubo, jes ! amikoj esperantistoj, de Kubo.

Ĉio estas la «miraklo» de la Esperanto !! Kaj ili parolis pri tiu forlando sed proksima ĉar, ĝenerale, ni konas en Francio.

Mi havis ŝancon babili kun DAIMI kaj MIGUEL.

Kiel vi sukcesis veni en Francion ?

Miguel : ni sciis ke ni povos uzi la pasportan servon (unua persono en ĉiu lando povas doni adresojn de esperantistoj).

Daimi : sed ni konis Gresillon, la centro de esperantista kulturo, kaj ni havis adresojn pere de ili.

Kio estas via laboro ?

Miguel : mi estas instruisto de la angla lingvo.

Daimi : mi estas inĝeniero agronomo.

Kiam vi komencis lerni esperanton ?

Miguel : en mil naŭ cent ok dek ok, preskaŭ kvar dek jarojn.

Daimi : en mil naŭ cent nau dek tri, preskaŭ tri dek jarojn kaj ni parolas ĉiun tagon, hejme, daŭre, ambaŭ.

Kial vi celis lerni Esperanton ?

Miguel : la lingvo Esperanto plaĉas al mi, koni kaj skribi kun virinoj kaj viroj en aliaj landoj estas serĉi pacon ĉiam, hodiaŭ la amikeco kontraŭ la milito.

Daimi : por malkovri dum vojaĝoj amikojn sen bezoni lerni ĉiujn lingvojn kaj imagi kanzojn en Esperanto en internacia lando tio estas provi ke la lingvo ne estas problemo, ĝi estas solvo.

Ĉu vi ŝatas Francion ?

Miguel : mi konas bone la simbolon « LIBERTE EGALITE FRATERNITE » kaj plaĉas multe al mi la bela ideo.

Daimi : Francio estas ankaŭ la lingvo de poezio, Victor Hugo (multe ktp....).

Kial vi preparis prelegojn ?

Miguel : ni volas paroli pri nia lando kial Usono volas forigi Kubon de 1959 kun la blokado.

Daimi : mi volis paroli pri la vera vivo en Kubo (manĝaĵo ĉefe).

Mi aldonas ke mi vidis la poezian senton de Daimi kiam, en Marsejlo, ni iris apud la palaco du « pharo » Ŝi vidis sur pordo la simbolon de la universitato AMU kaj ŝi pensis male al la vorto pli grava en la mondo

« AMU » kun la KORO !!!!

Ĝi estas bela bildo en iu mondo kiu pensas nur mono, monokaj mono

PS : Miguel kaj Daimi venas en Francion, Orleans, post la Ciotat, Marseille, le Beausset kaj ili iros en Berlinon kaj revenos en Parizon.

Bonan vojaĝon



Esploro de Esperanto-muzeo en Japanio

Thierry Spanjaard

Kiam mi vojaĝas, mi ĉiam serĉas, kiel renkonti esperantistojn en diversaj lokoj. Kelkfoje, mi havas ŝancon partopreni en kunveno aŭ iu tipo de evento, sed tiu ĉi jare en Japanio, ni nur havis la eblon viziti la Esperanto-Muzeon en Jokohamo. La vizito iĝis unu el la plej gravaj momentoj el mia vojaĝo.

Mi estis survoje inter Tokio kaj Osako, kaj haltis en Jokohamo. Post dek kvin minuta trajnvojaĝo de la stacidomo Jokohamo, mi atingis la malgrandan trajnstacion



Idogajo (Idogaya). De tie, estis mallonga piedirado por malkovri la Esperanto-Muzeon. La muzeo situas en malgranda domo en loĝdoma kvartalo. Mi estis bonvenigita de Sibayama Zyun'iti kaj Doi Hirokaz, la ĉefaj respondeculoj de la muzeo. La ideo pri la muzeo estis starigita post la 92-a Universala Kongreso en Jokohamo en 2007: Sibayama Zyun'iti estis la Prezidanto de la Landa Kongresa Komitato kaj Doi Hirokaz kaj lia edzino Doi Ĉieko estis inter la ĉefaj organizantoj de la evento.

La celo de la Esperanto-Muzeo estas konservi multajn arĥivojn pri Esperanto kaj aparte pri la





japana Esperanto-movado por evidentigi al ĉiuj la sukceson kaj la tutmondiĝon de la internacia lingvo. Pro tiu celo, la respondeculoj de la muzeo amasigas grandan kvanton de libroj kaj revuoj kaj ankaŭ kelkajn objektojn. La diversaj ĉambroj en la muzeo nomiĝas laŭ bone konatajn nomojn: Lidia Zamenhof, Hector Hodler, Adam Zamenhof, Edmond Privat, ktp. Ili posedas grandajn kolektojn da libroj, ambaŭ originalaj verkoj en Esperanto kaj tradukoj el aliaj lingvoj. La muzeo aparte enhavas gravajn malnovajn dokumentojn, ekzemple « La Revuon » eldonitan de LL Zamenhof kaj publikigitan en 1911. Ili ankaŭ havas lernolibrojn pri Esperanto en multaj lingvoj, kaj longtempajn kolektojn de revuoj, tiel kiel « La Beletra Almanako »,



« Monato », « Samideano », « La Mondo sen armeo », kaj aliaj. Kompreneble, la muzeo rilatas kun UEA kaj aliaj gravaj esperantaj institucioj, do ili havas kompletan kolekton de « UEA jarlibro », de la komenco en 1908 ĝis la fino en 2018.

La muzeo ankaŭ estas deponejo de la arĥivoj de la Japana Esperanto-movado, do ili konservas revuojn tiel kiel « La bulteno de Kobe Esperanto-Asocio », « Senlimo », kaj multnombrajn librojn en la japana pri Esperanto.

La Esperanto-muzeo en Jokohamo ankaŭ funkcias kiel Esperanta lernejo: kurso estis okazanta kiam mi vizitis. Mi ankaŭ trafis la oportunecon fari intervjuon de la afablaj respondeculoj Sibayama Zyun'iti kaj Doi Hirokaz por mia Jutuba kanalo EsKu – Esperanto-Kulturo, kion vi povos vidi post kelkaj monatoj.

Entute, mi estis afable akceptita kaj ĝojis renkonti ĉiujn tie. Se vi havas oportunecon viziti la Esperanto-Muzeon en Jokohamo, ne hezitu : mi ne dubas, ke vi estos same afable akceptita!



Mi dankas vian tutan novan teamon pro la grandega laboro jam farita por daŭre eldoni la kvaronjaran gazeton de Esperanto-Provence. Mi gratulas vin pro la grandega farita laboro, ĉefe por renovigi la maketon de la ĵurnalo.

Por helpi vin ĉiam pliboniĝi, mi havas kelkajn rimarkojn:

- Pĝ 1 - La nuna aliĝkotizo estas 10€, ne 6€. Ankaŭ indas ĉiam precizigi, ke la klubo Esperanto-Marseille partoprenas en la integrita kotizsistemo de Esperanto-France, do por la membroj de la klubo Esperanto-Marseille, kotizoj devas esti pagitaj al Esperanto-France kaj inkluzivas la kotizojn al Esperanto-Provence kaj Esperanto-France. Tiel, la kotizoj estas dedukteblaj de la impostoj, kiu signifas, ke, finfine, ili estas ege malmultekostaj.

- «Komo estas uzata ene de frazoj en lokoj, kie povas esti nature iom paŭzi, ekz. antaŭ subfrazo : Li diris, ke li amas ŝin. Mi vidis virinon, kiu portis paketon.» (el PMEG).

- «La vorto Esperanto origine estis participo kun la signifo “esperanta persono”. Tiu participo poste fariĝis propra nomo de lingvo, kaj estas tial skribata majuskle.» (el PMEG)

- «Ne metu spacetojn antaŭ punkto, demandosigno, krisigno, komo, du-punkto, punktokomo, tripunkto kaj

apostrofo.» (el PMEG)

- Ĝenerale, mi ŝatas koni la nomon de la aŭtoro de ĉiu artikolo, tiu estas aparte grava, kiam la aŭtoro skribas «mi» en sia teksto.

- Pĝ 16. en Greziljono la Naturisma Verda Semajno, kunorganizita de la Esperanto Kulturdomo kaj de INOE (Internacia Naturista Organizo Esperantista). INOE estas internacia asocio, kiu havas membrojn en pli ol 20 landoj, sed 40% de la estraro kaj 14% de la membraro de INOE estas membroj de Esperanto-Provence.

En la supra teksto PMEG estas la Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko, havebla rete ĉe <https://bertilow.com/pmeg/> kaj papere de Esperanto-Toulouse. Mi ege rekomendas tiun legadon, laŭ mi la duan biblion de Esperanto post PIV (Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto).

Komprenu, ke tiuj rimarkoj ne estas kritikoj sed iloj por plibonigi la gazeton estontece. Mi gratulas vin denove, kaj bondeziras al vi plenan sukceson por la estontaj eldonoj de nia federacia gazeto!

Mi esperas, ke vi publikigos tiun leteron en la rubriko «leteroj de la legantoj», ne hezitu mallongi ĝin, se necesas.

Plej amike.

Thierry Spanjaard

Prepartempo: 5 minutoj
Kuirtempo: 25 minutoj
Nivelo: Komencanto

Korsikaj Kanistrelli

Rosy Inaudi

La bongustaj korsikaj sekaj biskvitoj nomataj kanistrelli estas vera institucio sur la Insulo de Beleco. Ekzistas multaj variaĵoj de kanistrelli: migdala kanistrelli, citrona kanistrelli kaj ankaŭ aniza kanistrelli.

Kanistrelli estas perfektaj por veganoj aŭ vegetaranoj, ili ne enhavas ovojn aŭ lakton.

Ingrediencoj :

- 250g faruno
- 7cl oleo (arakida, sunflora aŭ olivoleo)
- 7cl blanka vino
- 75g sukero
- 1/2 saketo da bakpulvoro
- 1 pinĉo da salo

Preparado :



- 1 - Antaŭvarmigu vian fornon ĝis 170°C..
- 2 - Miksu la sekajn ingrediencojn: faruno, sukero, bakpulvoro kaj pinĉo da salo. Se vi havas starmiksilon aŭ kuirejan roboton, bonvolu uzi ĝin.
- 3 - Verŝu la blankan vinon kaj oleon, poste miksu por kombini. Atentu miksi milde, ĉar ĉi tio pli similos al buterkekso ol al kukpasto.
- 4 - Rulu 1cm-dikan paston sur tabulo aŭ bakpapero. Vi ankaŭ povas meti ĉi tiun paston sur oleitan bakplaton.
- 5 - Metu migdalon sur ĉiun kuketon (ĉi tio estas laŭvola), tiam aspergu la kuketojn per glazura sukero.
- 6 - Post kiam la kanistreloj estas tranĉitaj, simple ŝmiru la supran flankon per blanka sukero.
- 7 - Baku la bakplaton en antaŭvarmigita forno je 170°C (330°F) kun ventolilo dum 25 minutoj. La baktempo povas varii depende de la dikeco de viaj kukoj (ju pli dikaj la kukoj, des pli longe ili bakos).
- 8 - Forigu la kanistrelojn post kiam ili estas orbrunaj.
Kaj ĝuu...!

À noter sur votre agenda



Dans notre fédération

Plusieurs cafés linguistiques “esperanto” :

1^{er} jeudi de chaque mois - 18h - Marseille (13)

La Passerelle - 26 rue des Trois Mages (près du Cours Julien) - 6^{ème}

infos : *Thierry Spanjaard* - 06 09 18 28 51

Dernier jeudi de chaque mois - 17h - Lorgues (83)

“Carnets de voyage” - 12 avenue Allongue (rue face à la mairie)

infos : *Jean-François Cousineau* - 06 82 53 52 02

En France

pour les séjours à Grésillon ou Kvinpetalo, voir les sites respectifs

Baugé (49) - Château de Grésillon

<http://gresillon.org/?lang=fr>

Bouresse (86) - Kvinpetalo

<http://www.kvinpetalo.org>

Août 9-16 - Baugé - Château de Grésillon: 98^e Congrès de SAT

<https://eventaservo.org/e/ad39fc>

Août 24-29 - Château de Grésillon: 6^e Semaine verte du naturisme

<https://www.esperanto-naturismo.org/agadoj>

Août 30 / Sept. 6 - CHM Montalivet: Séjour dans un centre naturiste

<https://www.esperanto-naturismo.org/agadoj>

Septembre 6 - La Ciotat: Forum des Associations

Septembre 7 - Marseille - Vieux-Port: Forum des Associations

Ailleurs en Europe et dans le monde

Juillet 19-26 - Belgrade (Serbie):

58^e Congrès International de l'éducation - Eo ILEI

<https://2025.kongreso.org>

Juillet 26-août 2 - Brno (Tchéquie):

110^e Congrès mondial d'espéranto

<https://uk.esperanto.net/2025/>

Août 9-16 - Cisarua (Indonésie):

81^e Congrès international des jeunes espérantophones (IJK)

<https://ijk2025.tejo.org/novajoj/>